# TEJO-aktuale: numero 113, 2003-05-26

---

T E J O - A K T U A L E N-ro 113 (26 majo 2003)

---

Senpaga informletero de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
<http://www.tejo.org>;

---

1. INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN SVEDIO: INTERNACIA LINGVOKURSO
2. INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN SVEDIO: ANTAŬKONGRESO EN GERMANIO
3. TEJO-VIKIO: NUNA STATO DE LA JUNULARA E-MOVADO EN ĈINIO
4. KAMPANJO "EŬROPO 2004"
5. LINGVA FESTIVALO EN RUSIO
6. NOVA KLUBO EN IRANO
7. NOVA RETLISTO POR LESBANINOJ

---

1. INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN SVEDIO: INTERNACIA LINGVOKURSO

Dum la Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazonta en Lesjofors (Svedio) de la 19a ĝis la 26a de julio, okazos E-kurso (laŭbezone plurnivela).
Prezento en pluraj lingvoj troveblas ĉe:
<http://www.tejo.org/ijk/ilk_info.php>;.

---

2. INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN SVEDIO: ANTAŬKONGRESO EN GERMANIO

Junulara renkontiĝo en la domo de la Hamburga Esperanto-Societo okazos la 17an kaj la 18an de julio, do tuj antaŭ la IJK. Post la renkontiĝo, ĉiuj povos kunveturi al IJK. Aliĝu ĉe <http://www.esperanto.de/hamburg>;.

---

3. TEJO-VIKIO: NUNA STATO DE LA JUNULARA E-MOVADO EN ĈINIO

Zhu Xin rakontas pri siaj spertoj en la junulara E-movado en Ĉinio dank' al la nova vikio de TEJO. Oni ankaŭ povas legi informojn pri la junulara E-movado de Germanio, Kanado, Norvegio, Rusio, Svislando, Ukrainio kaj Usono. Kio okazas en via lando? Esprimu vin aŭ legu kion aliaj skribas ĉe <http://www.tejo.org/vikio/Landaj_Sekcioj>;!

---

4. KAMPANJO "EŬROPO 2004"

Dum 2004 Eŭropa Unio pligrandiĝos kaj ankaŭ okazos eŭropaj balotoj; ĉi-okaze planatas eŭrop-skala kampanjo por lingva demokratio. Informoj ĉe
<http://esperanto.bretonio.free.fr/eŭropo.htm>;.

---

5. LINGVA FESTIVALO EN RUSIO

Okazis en Volgogrado (Rusio) la 2a Lingva Festivalo. Estis prezentataj 17 lingvoj. Pliaj detaloj ĉe:
<http://www.stelaro.by.ru/vejc/esp/eventoj_lfrezultoj2.html>;.

---

6. NOVA KLUBO EN IRANO

Afganaj gejunuloj inaŭguris E-klubon en Maŝad (Irano). Fotoj videblas ĉe:
<http://photos.yahoo.com/bc/esperanto_ir>;

---

7. NOVA RETLISTO POR LESBANINOJ

Kreiĝis <http://groups.yahoo.com/group/gejinoj/>; por lesbaj, ambaŭseksemaj kaj transseksaj virinoj, kiuj parolas en Esperanto. La grupo estas "virina spaco": Nur homoj, kiuj identiĝas kiel inaj, rajtas membri.

---

TEJO-AKTUALE - Senpaga informletero de TEJO

La ideo: <http://www.esperanto.org/tejo/publikajhoj/aktuale/koncepto.html>;.
La arĥivo: <http://www.tejo.org/tejo-aktuale>;.
Por aboni sendu mesaĝon al <majordomo@esperanto.org> kun la enhavo:
subscribe tejo-aktuale
Informojn kaj komentojn sendu al <tejo-aktuale-red@esperanto.org>.
La teamo de TEJO-aktuale estas:
Jevgenij Gaus, Giuseppe Castelli, Chuck Smith.
Tiun ĉi numeron redaktis Chuck Smith kaj Giuseppe Castelli.
Resendis per Abonu.com Slavik Ivanov.